

& La perfidita junoo:

< Rekante 17 el 31 aŭ 15 el 29 batoj por strofo, entute 434 aŭ 406 paŝoj dum 5 minutoj. Poemon verkis William Auld. Baladigis Martin Strid (2015) komponub nova melodio, alternative donanta melodion kaj rekantaĵon sudinsulajn de Jalgrujma balado.>

(#Melodioj:

(

(#Nova: <:31> /mi dore mi so mimi rere mimi; fa fafa mi re (rere dore)?(soso sofa) mimi

(#Rekantaĵe: mi dore mi so mimi rere mi mi; fa fafa fa mi rere doTi La La a))

?

(#Sudinsula: <:29> /La Tido TiLa La3lMi LaLa Tido TiLa; dolre mi3mi falmi mi redo mimi miLa;

(#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a))

)×14)+

(&Strofoj:

'1 (#Nova:

/Jam unu fojon ni al fremdaj bordoj ;
iris batale kontraŭ faŝisthordoj.

(×: **Ni, junaj, ne toleru plu la honton,
; ke oni al ni rabas la estonton!**))

?

(#Sudinsula:

/Jam unu fo2jo2n ni al fremdaj bordoj ;
i2ris bata2le kontraŭ faŝisthordoj.

(×:; **Tondru danco tre ĉarme ; nun
tretu fiere ĉiuj en la ĉen' ; staras jen
mastrino.**))

'2 Pro mia kredo mi buĉadi lernis, ; kaj
multajn homajn vivojn mi ekstermis.

.....

'3 Aŭ mi supozas tion: mi ne vidis. ; En
alto mi aeroplanon gvidis,

'4 kiu bombegojn portis en la ventro, ;
kaj vomis morton al la urbocentro.

'5 Poste ekfloris lantaj fulmofungoj. ;
Milito kvazaŭ per gigantaj ungoj

'6 la grundon gratis kaj la mondon
tordis. ; Kaj tiel homofratoj ĉie mortis.
.....

'7 Ni, la junuloj, iris en inferon ; por
tranĉi el la monda mam' kanceron.

'8 Ni kredis je pli forta posta sano, ; pli
pura vivo laŭ pacama plano.

'9 Oni al ni promesis la futuron, ; se ni
likvidos la faŝistteruron.

'10 Mensogo fia! Kion ni ricevis, ;
kiam la falsa bestregimo krevis?

'11 Ĉu pacon kaj esperon kaj
progreson? ; Ĉu oni ja plenumis la
promeson?

'12 Ne! Aŭdis ni, veninte el batalo ; La
mondon savis vi por kapitalo!

'13 Oni al ni proponis la premiojn ;
malnovajn kredojn kaj malnovajn
diojn.

'14 Ni, junaj, ne toleru plu la honton, ;
ke oni al ni rabas la estonton!